R.A.D.E. INFORMILO

ROTARIA AMIKARO DE ESPERANTO

RADE INFORMILO N.35 **Majo 2015**

Karaj membroj de nia Rotaria Amikaro de Esperanto!

Jam alvenis la período de niaj konferencoj, kongresoj, ekspozicioj, renkontoj kaj festoj, kaj ni antaŭĝojas povi brakumi plurajn el inter vi en rotaria amikeco. Kaj certe la plej grava evento estos la Monda Konferenco ĉi jare en Brazilo, São Paŭlo, kie nia stando atendos vian viziton.

Rotary 2015 International Convention

Estas konfirmita la partopreno de RADE dum la Monda Kongreso en São Paŭlo per sia **inform-stando n.170** en la grandega Halo de Anhembi. Pluraj rotarianoj el diversaj landoj deĵoros tie por informi pri nia Amikaro kaj pri Esperanto specife.

Dek miloj da kongresanoj trairos la 300 standojn kaj oni facile povas imagi la malfacilaĵojn de la komunikado inter rotarianoj el pli ol 150 diversaj nacioj. Nia insulo de plena kompreniĝo inter la lingva Babelo de la Kongreso, estos malfermata por via ŝatata vizito! Speciale ni atendas la brazilajn RADEanojn, kiuj estas plejparte nekonataj ĉar la distancoj inter ni estas grandegaj en nia kontinenta lando.

Kiu estas la diferenco inter RADE (Rotaria Amikaro De Esperanto) kaj ReKE (Rotaria elekronika Klubo Esperanto) ?

RADE estas amikaro (Rotary Fellowship) t.e. sendependa grupo de Rotarianoj kiuj havas komunan pasion. Partoprenintoj en amikaro amikiĝas amuze kun multaj aliaj samsimpatiantoj en la mondo.

(https://www.rotary.org/myrotary/en/take-action/empower-leaders/form-rotary-fellowship)

ReKE estas Rotaria Klubo (Rotary Club) t.e. **servo klubo** kies celo estas servo al la monda komunumo.

(http://eo.wikipedia.org/wiki/Rotario)

Kutime la rotariaj kluboj komunikas en la naciaj lingvoj. Ekzemple en Belgio oni havas klubojn, kies lingvoj estas unu el la tri naciaj lingvoj (la nederlanda, la franca aŭ la germana). Ekzistas eĉ klubo kies lingvo estas la angla (http://www.recbe1.be/). Do tute ne mirindas, ke ekzistas klubo, kies lingvo esta la esperanta. En la rotaria klubo la lingvo estas nur komunikilo por realigi la celojn de R.I.

Konkludo : En nia informilo vi trovos novaĵojn el rotariaj kluboj, kies celo estas nur rotarianaj, kaj el esperantujo, kies celo estas faciligi la interkompreno inter homoj de la mondo.

DISTRIKTA KONFERENCO 2050 (Italio)

La unua ĉijara grava evento por ni ĵus okazis en Italio, la 1-an de majo, kiam du membroj de nia ROTARIA EKLUBO ESPERANTO havis la unikan okazon fotiĝi kun la ĉi jara Monda prezidanto RI, Gary Huang (el Taivano), kiu okaze de la distrikta konferenco vizitis la membrojn.

Sara Spanó kaj **Francesco** Maurelli tre emociitaj nin rigardas. Ili estas novaj membroj de la eklubo kaj jam en sia unua konferenco estis bonsxancaj!

DISTRIKTA KONFERENCO 4530(Brazilo)

Pluraj brazilaj rotarianoj esperantistoj, membroj RADE, renkontiĝis dum la distrikta konferenco, 1-a de majo, en Brasilia por decidi pri nova humaneca projeto internacia.

VIGLA PARTOPRENO EN LA ROTARIA eKLUBO ESPERANTO.

Ĉiu semajne la membroj de la **Rotaria eKlubo Esperanto** havas la moralan devon, kiel en tradicia klubo, partopreni la semajnan programon kaj eniri elektronikan kunsidejon. Oni komentas la temon elektitan de la prezidanto de la klubo kaj ofte aperas viglaj debatoj inter la membroj. Krome estas daŭre sciindaĵoj, raportoj kaj planoj pri traduko de libroj, okazintaĵoj de la membroj.

Inter la lastaj temoj debatitaj elstaras la jenaj:

- Avantaĝoj kaj malavantaĝoj de la Esperanto-movado - Vikipedio - Efika uzado de energio – Naturkuracado - Laborplano por 2015-2016 – EŬRO - Monataj mesaĝoj de la Prezidanto RI kaj de la Guberniestro D.2050 – Amikeco – Genetiko kaj homa egoísmo – Poliomjelito – La Zamenhofa Revo inter Lingvistiko kaj Religia Planado - Spertoj pri la Rotaria Fondaĵo – Pragmatismo estas la filozofio de Rotary – Historio de Rotary – Rotaria Etiko kaj Moralo – Profesia Agado kaj Etiko en Rotary – Lingva ekologio – Paul Harris, Pioniro de Nova Mondo, libro kiun la eklubo nun tradukadas al pliaj naciaj lingvoj.

RADE-a retejo

Nia pasinta retejo estis piratita kaj iĝis eĉ danĝera, ĉar entenis trojan ĉevalon. Dank'al Guillermo Macias(R.C. Aguascalientes, Meksiko) ni baldaŭ havos novan retejon titolitan www.radesperanto.org.



Ni atendas viajn reagojn kaj artikolojn (skribu al nia sekretario Giuseppe Grattapalia aŭ al Guillermo Macias : lic.guillermo.macias@gmail.com)

Ĉu nia pasio, esperanto, kongruas kun nia agado en R.I. ?

Bonvolu legi la artikolon de Fabricio Valle en la revuo ESPERANTO (1291 (5) Majo 2015 (vidu malsupre) kaj pripensi la konkludon. Mia flanke mi pensas ke la kreado de ReKE estas tipa movadido sub la signo de bona kunvivado inter TIKO ĉeesta laboro, sed en ReKE esperanto estas nur komunikilo kaj la rotariaj celoj plej gravas.

Joseph van der Vleugel

RADE ESTRARO

Honora Prezidanto : Eskil Svane (Svislando) pouzasco@gmail.com

Honora Prezidanto : Marc Levin (Francio) marc.j.levin@orange.fr-

Prezidanto : Joseph van der Vleugel (Belgio) joseph.vandervleugel@skynet.be

Sekretario : Giuseppe Grattapaglia (Brazilo) bonaespero.brasil@gmail.com

Estrarano : Sherry Wells (Usono) : esperantosherry@tm.net

Estrarano por Rotarakto Leandro Freitas (Brazilo) : Freitas.letras@gmail.com

La Estraro de ROTARY INTERNATIONAL stimulas la rotarianojn kun komunaj interesoj pri profesiaj, humanecaj, kulturaj aŭ distraj aktivecoj starigi neformalajn grupojn por realigi la celojn de R.I. La grupo RADE, konsistanta el rotarianoj, kiuj uzas kaj apogas la internacian

lingvon Esperanto, celas realigi la idealojn de ROTARY INTERNATIONAL por la Interkompreno, la Amikeco kaj la Paco inter la nacioj, faciligi la personajn kontaktojn inter Rotarianoj de malsama lingvo-deveno kaj disvastigi la humanecajn internaciajn servojn de R.I.

Membriĝu senkoste en nia amikaro,

se vi apogas niajn celojn, kiuj kongruas perfekte kun la kvar etikaj principoj de Rotary!

partoprenu en nia grupo!

1. Nomo .....
2. Rotaria Klubo kaj Distrikto .....
3. Membro numero de R.I ek de kiam.....
4. Respondecoj en Rotary .....
5. Urbo kaj Lando .....
6. Adreso .....
7. Telefono kaj retpoŝto .....
8. Profesio .....
9. Esperanto parolanto ek de kiam .....
10. Parolataj lingvoj.....
11. Laŭvolaj pliaj informoj.....
12. Dato, subskribo.....

Bonvolu resendi tiun-ĉi aliĝilon al nia sekretario (bonaespero.brasil@gmail.com)

* Direktivoj por verki artikolon por Malferme: *www.slideshare.net/revuo_esperanto/malferme*

La horo kaj la vico de la Esperanto-movadidoj

Fabrício Valle

Fakto estas, ke la E-asocioj plonĝis en maron de krizo. Ne nur UEA, sed ĉiuspecaj organizaĵoj en Esperantujo. Oni diras, ke la kaŭzo de tio estas unuflanke la tutmondiĝo kaj la teknologio de informado kaj komunikado (TIKO) kaj aliflanke la nereago kaj neadaptiĝo de la E-asociaro al la nova situacio. Prave, tiu tute nova tutmonda kunteksto, kiu faris el vastega mondo babelan vilaĝon kaj malfermis ĉiujn eblojn al Esperanto, samtempe alportis la eblon al nur unu homo, tute sola, fari por la diskonigado de Esperanto pli ol stagnanta organizaĵo kapablas fari. Tamen, eĉ okaze de asocioj kiuj sukcesis post gapa admiro iel elturniĝi kaj trairi la TIKO-vojon, la krizo fariĝis realaĵo. Vere, la krizo de la E-asocioj kuŝas ne nur en la alkroĉiĝemo al la tradicia agadmaniero kaj/aŭ nekapablo reagi rapide al la novaj scenejoj. Kion konkludi el tio? La tezon, kiun ni defendas de pluraj jaroj en Brazilo kaj nun prezentas al la internacia samideanaro estas la jena: la historia misio de la E-movado jam estis plenumita, cetere tre brile, kaj resti umbilike ligita al ĝi, malfermante la okulojn al la novaj misioj kiuj sin prezentas kiel modernajn kaj necesajn movadajn tendencojn, estas elekto de stagno. Nu, kiu estas tiu historia misio, kiu sola ne plu kapablas teni nian asocian vivon vigla?

Nu, kiam Zamenhof iniciatis nian lingvon, tute sola, ĝi bezonis movadon kiel la nian, por transiri el la stato de senviva planita lingvo al tiu de plena vivanteco. Tio eblis nur per disvastiĝo de nia mirinda lingvo kaj la vojo por tio estis dum jarcento diskonigi kaj instrui Esperanton, krom praktiki ĝin en amikaj rondoj. Per tio Esperanto el gabineto de simpla okulisto konkeris sian lokon en la historio de la civilizacio por ĉiam. Niaj historio, kulturo, literaturo kaj movado estas rezulto de la agado de la E-movado. Gratulojn!

Tamen, nuntempe la movadaj instancoj devas konsideri la jenajn realaĵojn:

- unu sola konanto de TIKO povas diskonigi Esperanton pli efike kaj vaste ol testuda asocio;
- Esperanto povas esti lernata per la reto. Plena de signifoj estas la granda sukceso de la retejo lernu.net. Krome, laŭ Esperanto disvastiĝos pli kaj pli la tendenco estos, ke la E-instruado fariĝu afero ĉefe de profesiuloj, lingvo-lernejoj kaj publikaj lernejoj;
- Per la reto oni povas amikiĝi, babile Esperante, kunsidi, aĉeti librojn kaj esperantaĵojn. Ĉion eblas fari per TIKO, sen la neceso ĉeesti klubon kaj al ĝi membriĝi.

Nu, ĉu ekzistas turnopunkto por niaj E-centroj en tiuj tre "malfavoraj cirkonstancoj"? Jes ja. Jen nia tezo: forlasi la tradician mision diskonigi kaj instrui Esperanton, se temas pri celoj de la asocia vivo, asignitaj en la statuto de ĉiuj E-asocioj! Diskonigado kaj instruado de Esperanto restu nur kiel rimedoj por atingi novajn celojn, por plenumi ne unusolan novan mision, sed plurajn misiojn. Kiajn misiojn? Fakajn misiojn! Plugendaj kampoj atendas nin sur ĉiuj sferoj de la homa vivo: sociala agado, socia turismo, homaj kaj lingvaj rajtoj, Unesko-agado (edukado, scienco kaj kulturo) junulara vivo, universitataj esploroj, esperantista ekonomio kaj multaj aliaj tre konkretaj laborkampoj. Rilate ekonomion, la afero koncernas ankaŭ entreprenojn, sed restas granda potencialo por senprofitcelaj Esperantaj ne-registaraj asocioj (E-NROj) sur la kampo de solidara ekonomio, justa komerco ktp.

Nu, kio pri E-movadidoj en tiu ĉi kunteksto? De 1887 ĝis nun ni havis nur unu movadon, la Esperantan, ĉar la misio estis tre "simpla": per diskonigado kaj instruado de Esperanto vivantigi ĝin! Kiel jam dirite, la E-movado brile sukcesis. Nun venas la horo kaj la vico por plenumi ne nur unu "simplan" mision, sed plurajn kompleksajn misiojn, ligitajn al la aplikado de Esperanto, sub la signo de la daŭropovo. Ĉar ĉiu el tiuj pluraj misioj postulas specifan labormetodon, fakan kompetenton, propran strategion, foje striktan celpublikon kaj specialajn iniciatojn, ne estas eble, ke nur unu movado zorgu pri ĉio. De nun estas necese pluraj E-movadidoj, ĉiu en sia specifa kampo de agado. Jen la E-movadidoj. Ili estos tiel multaj kiel la fakoj kaj la specifaj bezonoj de la mondo: Sociala E-entreprenismo (bonfara laborkampo), Ekonomia Esperantismo (ekonomiaj aktivaĵoj), Novbabelismo (la propedeŭtika valoro de Esperanto en la starigo de nova industrio de lingvoinstruado), E-landologio (internacia amikeco sub nova vestaĵo) kaj multaj aliaj.

Ne estas limo al la kreado de E-movadidoj, tamen gravas, ke ili naskiĝu sub la signo de bona kunvivado inter TIKO kaj ĉeesta laboro. Teknologio estu ilo de konkreta E-agado por transformi la mondon. La esperantistoj povas doni bonajn ekzemplojn de internacia agado al la tuta mondo. Anstataŭ nur pledi senfine por Esperanto kaj klopodi konviki la aliajn lerni kaj uzi ĝin, ni estu la unuaj uzantoj. Ne gravas ĉu la celo de la klubo aŭ asocio, granda aŭ malgranda, estu kompleksa aŭ ne. La faka celo povas esti relative simpla kiel diskonigi kaj instrui Esperanton. Gravas, ke ni forlasu nian etan keston por kuraĝe eniri senfinan E-laborujon. Tion ĉi ni povas nomi novelanismo, per kiu ĉiu asocio povos alpaŝi novan fazon de la historio de Esperanto kaj superi la krizon.

Fabrício Valle estas la redaktoro de la revuo *Esperanto*